



# *Kajeroj* *el la Sudo*



---

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

---



Nº 19 - JUL. - AŬG. - SEPTEMBRO - 1993



## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustin Benito

Nuevas Lomas, sec. 2, part. 13, bloq. 1,P-7, 2-A  
03015-ALICANTE. (Hispanio)

\*\*\*\*\*

Sekretario: Jesus de las Heras Giménez

Av. Juan Carlos I, 24, 2/G, Edif. Nueva Ronda, 1  
30008-MURCIA.

\*\*\*\*\*

Kasisto: Nicolas GIL Carballo

Apartado 305, 24080-LEON.

Envios de cotizaciones sin coste adicional a nombre del mismo, desde  
cualquier punto postal de España, a la Cartilla Postal nº 29-85.039.477.

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9ª.C.  
50002-Zaragoza. (Hispanio)

\*\*\*

Miguel Fernández Martín

C/ Santa Genoveva, 58. 6ª C.  
28017-Madrid. (Hispanio).

Kovrilo: Leo Ferré, kantisto-aŭtoro, muzikisto kaj poeto, pura idealisto  
forpasinta la 14-an de julio 1993.

Enhavo:

Leo Ferré, neforgesebla! . . . . .	3/ 4	pĝ.
La Generala Asembleo de HALE . . . . .	5	"
La problemo de homonimaj vortoj kaj nomoj . . . . .	6/ 7	"
Bonvolu ridi... sed ne tro! . . . . .	8/ 9	"
Ekologia angulo. REUZ-Papero . . . . .	10/11	"
Recenzo: "La karmezina manuskripto" . . . . .	12	"
Korespondadi deziras . . . . .	13	"
Historia respondo de indiano . . . . .	14/15 /16	"
Administra angulo /Agrabla novaĵo . . . . .	17	"
Iberoj akaparas premiojn en beletro . . . . .	18	"
La junuloj pretaj por la batalo . . . . .	19	"
Originala Poezio/ Provo de intuo ĉirkaŭ la poezio de M.Fernández	23"	

# Leo Ferré, neforgesebla!



Kantisto-aŭtoro, muzikisto kaj poeto. Interpretanto de poetoj kaj poeto li mem, aŭtoro de centoj da kanzonoj kaj poemoj. Liberecano, utopiisma pensanto, idealisto, kiu pasis tra la vivo rigardante la stelojn de malproksima firmamento plena de puraj ideoj kaj revante pri pli harmonia kaj paca kunvivado sur la tero, tamen malgraŭ la karaktero iluzia de la interna idealisma miraĝo, neniam li perdis la perspektivon realan pri kio la vivo estas, kio ĝi devus esti sur nia planedo, sekve li estis senlaca batalanto por la homaj liberecoj kaj por pli justa kaj vivinda mondo.

Forpasis Leo Ferré, kiam li estis 77-jara, kaj forpasis ĝuste la 14-an de julio en tiu tago simbolanta popolan liberatingon, kiel lasta omaĝo de la idealisto al la memorfestoj.

Leo Ferré estis unu el tiuj anarkistoj puraj kiel tiuj de mia generacio, tiom abundaj tiam, kaj nun raraj, apenaŭ kompreneblaj en nia nuntempo: idealisto, kiuj ne toleris la perforton, el kie ajn ĝi venas, konvinkitaj plenplene teorie kaj fakte, ke la plej alta ŝtupo de ĉiuj liberecoj kuŝas ĝuste en tiu punkto: la interhoma paco kaj la absoluta respekto de unu homo al la alia. Do kohere kun tiu netuŝebla principo, Ferré deklaris antaŭ nelonge: "anarkio estas antaŭ ĉio respekto kaj amo al la ceteraj homoj, pro tio ĝi estas neatingebla".

Ferré aktive partoprenis en la memorindaj francaj eventoj de majo 1968, kie li estis unu el tiuj, kiuj donis idealisman sencon al tiu utopia printempo, kiu vekis en tiom da idealismaj koroj la plej grandajn esperojn. Simile al tiu legenda batalanto partopreninta en la konkero de Bastilo per fusilo kun la tubo malsupren, Leo pace batalis en tiu revolucio per kanzonoj kaj per la mirinda alporto de sia vervo apologianta pri la homaj liberecoj...

Ni, ĉiuj progresemaĵ hispanoj, ŝuldas al tiu homo

dankojn senlimajn: li solidare apogis nin dum la hispana intercivitana milito per kanzonoj kaj aktiva propagando. Li proklamis malkaŝe al la tuta mondo post nia malvenko, dum la jaroj sesdekaj, mesaĝon denoncantan la tiranion de Franko kaj la perversan karakteron de ties diktaturo, kiu reprezentis la morton. Ferré inspiriĝis el temoj hispanaj por verkado de multaj kanzonoj: "La Espero" -kanzonkolekto pri la hispana intercivitana milito-. Poste, li verkis "Franko, la morto", "Sipo hispana" kaj multajn aliajn. En certa okazo li deklaris: "min fascinas ĉio hispana, ne Hispanio kiel lando sed la puraj esencoj de la hispana popolo, temas pri gento admirinda, pensanta alimaniere ol la ceteraj". Eble iom influis tiun opinion la fakto, ke lia edzino, Maria Cristina Diaz, estas hispanino. Li promesis neniam viziti Hispanion dum la diktatoro estas viva, kaj li plenumis sian promeson: li vizitis Madridon en la jaro 1988. Bedaŭrinde la novaj generacioj perdis iom post iom la idealismon, kiu karakterizis la antaŭajn, kaj dum tiuj jaroj Ferré jam estis duonforgesita en Francio kaj preskaŭ nekonata en Hispanio...

Leo Ferré naskiĝis en Monako, kaj apenaŭ 11-jara li jam komponis sian unuan melodion por la poemo "Soleil couchant" de Verlaine. Li faris siajn unuajn studojn en Romo; la superajn kaj filozofion en Monako kaj Juron en Parizo. Plaĉis al li muzikigi poemojn de grandaj poetoj, kaj li tion faris pri poemoj de Baudelaire, Verlaine, Rimbaud, Apollinaire, k.a. laŭ li kiel rektan sistemon por diskonigi al la popolo la plej bonan poezion. Emociis lin ankaŭ aŭskulti la muzikon de Beethoven, Mozart, Debussy, Ravel, Bartok, Stravinski, lin kiu tute ne kredis la klasikismon, sed opiniis "ke gravas ĉiam aŭskulti la genion, kiam ĝi kapablas esprimi lirikajn mesaĝojn kun enhavo el tiom riĉaj estetikaj ideoj". Fakte, oni devas rekoni, ke li sentis pli grandan inklinon al la simfonia muziko ol al popularaj kantoj, kaj tiuj fajnaj eskvizitaj melodioj ofte aperis en liaj plej belaj kanzonoj.

Ferré estis unu el la unuaj kantistoj, kiuj muzikigis la poemojn de grandaj poetoj, post li faris la samon multaj kantistoj de Hispanio, Francio, Italio, k.a. Kiel idealisma kantisto-aŭtoro kaj protesto-kantisto, li, probable, ne havis rivalon: li kantis kontraŭ la tiranio, perforto kaj maljusteco.


*Li prikantis amon, liberecanajn ideojn kaj ĉiam la liberon.*

*Fama franca politikisto deklaris, apenaŭ li eksciis pri la forpaso de Ferré: "li estis kantisto tre amata de ĉiaj publikoj kaj simbolis la tradicion venantan el la mezepoko, kiu unuigis poezion kaj muzikon, altan estimon al arto kaj amon al la popolo".*

*Kun Leo Ferré malaperas granda kantisto-aŭtoro, senegala idealisto, bonega poeto. Profunde emociitaj niaj koroj funebras pro tiu dolora perdo. Ne gravas de kiu stelo vi al ni rigardas, ni promesas al vi, kara kompano Leo, ke ni restos fidelaj al via idealo, al nia idealo...*

*La Redakcio.*

\*\*\*\*\*



## **La ĝenerala asembleo de HALE**

La sufiĉe malfrua kunvoko de la ĉi-jara Asembleo donis kiel rezulton la absolutan neebulon kunordigi ĉiujn elementojn por efektiviĝi ĝin kadre de la Ĝenerala Kunsido de HEF en Valencio, kiel ni laŭstatute devas plenumi.

La demisio de la Kasisto kaj de ambaŭ Redaktoroj de nia bulteno "Kajeroj el la Sudo", la neĉeesto en la kunvenejo de Valencio de la Seviljaj estraranoj, kune kun diversaj gravaj neglektoj, kreis profundan krizon en la Asocio, tiel danĝeran, ke ĝi serioze minacas eĉ la ekziston mem de HALE. Antaŭ tia situacio, la iama prezidanto-fondinto de HALE, k-do Bernabeu, improvizis planon konsistantan en propono por renovigo de la estraro. Tiucele, li profitis sian restadon en Valencio por konsulti la plej aktivajn HALE-anojn, kies rezulto ebligas al li proponi al nia membraro jenan novan estraron:

Prezidanto: Martín Bustin Benito, el Alikanto.

Vicprezidanto: Manuel López Hernández, el Seviljo.

Sekretario: Jesus de las Heras Giménez, el Murcio.

Kasisto: Nicolas Gil Carballo, el León.

Junulfako: Jorge Moragues Penella, el Valencio.

La ĝisnunaj Redaktoroj, Miguel Fernández Martín kaj Antonio Marco Botella, el Madrido kaj Zaragozo respektive, akceptis daŭrigi la redaktoran taskon unu plian jaron, tio estas ĝis la

Ĝenerala Kunsido okazonta en Malago en 1994.

Preskaŭ ĉiuj ĉi-supre proponitaj k-doĵoj jam akceptis la koncernajn postenojn, kaj ni esperas, ke ankaŭ la ceteraj konsultotaj akceptos la siajn kiel pruvon de bonvolo por rapida solvo de la Asocia krizo.

Eventualaj sugestoj aŭ petoj estos ĉiam bonvenaj.

Ni dankas ĉiujn niajn k-doĵojn pro ties kunlaboremo

José M<sup>a</sup> Bernabeu

\*\*\*\*\*

---

## Lingva angulo

---

# La problemo de homonimaj vortoj kaj nomoj

---

Esperantisto el Kubo skribis al mi pri la problemo de homonimaj vortoj kaj propraj nomoj en Esperanto. Li prezentis sian demandon en la sekva maniero.

"...en P.I.V. aperas la vorto Krono (1) kun la jena difino: Helena dio, la patro de Zeŭso. Ĉar Krono ankaŭ simbolas - ĉe la antikvaj helenoj la Dio de Tempo kaj pro la fakto, ke tiu sama vorto, sed skribita per minuskla litero havas plurajn signifojn neniel rilatantaj al la unue citita; kio povas krei konfuzon kaze de elparolado, mi demandas: ĉu ne estos pli taŭge por nomado de la helena dio uzi la formon Kronoso?"

Se oni povus ŝanĝi la formon de nur unu propra nomo por eviti konfuzon, la afero ne estus tro grava, sed troviĝas en la leksiko de Esperanto pluraj similaj homonimaj paroj, konsistantaj jen el ordinaraj substantivoj, jen el substantivo kaj propra nomo. La sekvaj tri paroj ilustras la fenomenon de homonimaj radikoj, kiuj, malgraŭ identaj formoj en Esperanto, havas malsamajn etimologiojn.

1. a. bokso -fiŝo el la subordo de la perkoformaj fiŝoj  
b. bokso -aĝo de boksanto
2. a. fono -efektive ebena aŭ pro malproksimeco ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas aŭ elkontrastas  
b. fono -decibelo



3. a. pato -malprofunda senkovrila, kaserolo kun longa tenilo, servanta por friti
- b. pato -(en ŝako) pozicio de reĝo, kiu, estante la sola peco povanta sin movi, tamen ne povas tion fari sen meti sin en ŝakon.

En dua grupo estas paroj formitaj per substantivo kaj propra nomo. Ili estas diferencigeblaj en la skriba lingvo pro la inciala majusklo de la propra nomo sed en la parola lingvo ili estas same

identaj kiel la vortoj en la unua grupo.

1. a. ciro -ŝmiraĵo, por brilpurigi ledajojn
- b. Ciro -virnomo; i.a. de la granda persa reĝo (nacilingve Kuraŝ)
2. a. dieto -nutromaniero, obeanta difinitan regularon
- b. Dieto -nomo de parlamento aŭ politika kunveno en kelkaj eŭropaj landoj
3. a. dono -tio kio estas donita
- b. Dono -rivero en Sovetio
4. a. krono -cirkla ornamo
- b. Krono -helena dio, la patro de Zeŭso
5. a. kubo -regula sesedro
- b. Kubo -la plej granda el la Antiloj
6. a. liro -itala monunuo
- b. Liro -norda konstelacio
7. a. lineo -mezuro de longo, 1/12 de colo aŭ 2,256 mm.
- b. Lineo -fama sveda botanikisto, aŭtoro de baza klasifiko de la plantoj
8. a. loto -objekto (sagoj, osta kubo, bileto kun numero, ktp), kiun oni jetas aŭ elektas kaj laŭ kies hazarda pozicio aŭ indiko oni ion decidus
- b. Loto -patriarko, kiun liaj filinoj ebrigiis, por kuŝi kun li
9. a. omaro -genro de dekpiedaj krustuloj
- b. Omaro -araba virnomo

10. a. ramo -trabo uzata por rompi muron, aŭ maŝino en formo de stampilo por enbati en la grundon fostojn, pavimŝtonojn ks.  
 b. Ramo -duondio, heroo de la Ramajano, edzo de Sita
11. a. vasko -konkego, precipe de fontano  
 b. Vasko -ano de la ĉefgento, loĝanta en Vaskujo

Estas evidente, ke la ŝanĝo de Krono al Kronoso neniel solvos la pli vastan problemon de homonimoj en Esperanto.

Tuj, kiam oni komencas aliformigi parton de tiu ĉi leksika fenomeno, estos necese agi konsekvence kaj meti ordon ĉie. Facile, estos faritaj proponoj por modifado de propraj nomoj, sed estos treege malfacile atingi akordon. Dume, kaoso regos en la lingvo. Oni nur pensu pri kio okazos, kiam oni provos elimini la kunfuzon inter "kubo" kaj "Kubo". Ĉu la lando estu rebaptita Kubao? Kubio? Kuboo? Kuboso? Kubumo?

En la nuna stato de Esperanto, estas konsilinde ne tuŝi-fuŝi la lingvon.

Bernard GOLDEN

**Bonvolu ridi**



**Sed ne tro!**

Babilado inter amikinoj

-Oni devas rekoni, ke Victoria havis multe da kuraĝo konfesante al sia edzo ĉiujn siajn antaŭajn aventurojn.

Ĉu multe da kuraĝo? Mi dirus pli ĝuste multe da memoro!

\*\*\*\*\*

Grava problemo

SinJORino vizitas sorĉistinon por scii pri sia estonteco. Tiu konsultas la vitro-globon kaj anoncas:


-Mi vidas viron altan, belaspektan, blondan kaj riĉan!

La sinJORino demandas:

-Bone, kaj diru al mi: kion do mi faru pri mia edzo?



# Bonvolu fidi



# Sed ne tro!

## Rigardante la estonton

Geedzoj vizitas la kuraciston. La edzo ne fartas bone kaj lastatempe videble malfortiĝas. La kuracisto post zorgaj esploroj kaj kontroloj serioze diras:

-Sinjoro, mi ne scias kiel diri al vi...

La edzo postulas de li tujan decidon:

-Doktoro, mi volas scii ĉion pri mia sano..., diru al mi nudan veron!

-Nu, vi havas kanceron tiel vastan ke, eble vi vivos malpli ol ses monatojn.

De post tiu momento la edzo anoncas al ĉiuj geamikoj ke li havas aidoson kaj li nur vivos ne plu ol ses monatojn.

La edzino, malĝoja kaj scivolema demandas al li:

-Karulo, vi suferas kanceron, kial vi diras al ĉiuj ke vi havas aidoson?

-Ho, mia kara, mi ja mortos, sed mi faras mian eblon por ke vi poste, nepre ne enlitiĝos kun iu ajn alia!

\*\*\*\*\*

## Sentivo

Bona amiko havigas laborpostenon al alia. Tiu devas veturi tra la tuta lando. Li diras: -Tiu laboro ja interesas min. Nur tioma veturado estos problemo. Vi scias ke mi loĝas kun mia maljuna patrino kaj mia kato. Mi tre bedaŭrus forlasi ilin. Mi petegas al vi, ke vi informu min pri tio, kio okazos al ili.

Nelonge poste la vojaĝisto ricevas telegramon el amiko:

"Kamiono faris kaĉon el via kato".

Li afliktita, telefonas al la bona amiko kaj admonas lin: -Kiel vi kapablas anonci al mi tiel kruele tiun teruran novajon? Via telegramo devus diri: "La kato supreniris arbon". La sekvan tagon alia: "La kato falis de la arbo". Kaj fine alia: "Falinte de arbo, la kato estis dispremita de kamiono".

Ĉar tiel mi digestus iom post iom la malfeliĉon.

-Pardonu- petas la amiko, mi ne suspektis, ke vi estas tiel sentiva!

Kelkajn tagojn poste la vojaĝisto ricevas novan telegramon: "Via patrino supreniris pirujon"....

Maria Fernanda



EKOLOGIA ANGULO

## REUZ-PAPERO

La fabrikado de ne-reuz-papero produktas grandegajn problemojn en la medio. Ĝi polucias la aeron, la akvon kaj la teron. Ĝia plej negativa kaj danĝera flanko, kvankam malmulte evidenta, estas la restaĵoj de kloraj kombinaĵoj.

La kloraj kombinaĵoj estas produktitaj, ĉar oni uzas klorokalkon por blankigi la paperpaston. Ĉi tiuj substancoj, tre toksaj kaj akumulablaj, estas strangaj en la naturo, kiun ili polucias, se verŝataj en ĝin.

Fabrika mezgranda verŝas ĉiutage 20.000 ĝis 50.000 kilogramojn da klorajoj en la akvojn marajn kaj riverajn. Do poste la klorajoj aperas en la nutrad-ciklo kaj en la drinkeblaj akvoj.

Sciencaj analizoj jam identigis en la versaĵoj de tiaj industrioj pli ol 300 malsimilajn klorajn kombinaĵojn, kaj oni kalkulas, ke ili povas atingi eĉ pli ol 1.000. Inter la identigitaj estas kancerogenaj substancoj, kiel kloroformo kaj tetraklorido, kies uzo, pro ilia danĝereco estas tre kon-

trolita en iuj landoj, sed en aliaj, kiel Hispanio, tiaj industrioj verŝas ilin rekte en la akvojn.

Aliaj toksegaj komponantoj de la restaĵoj el paper-fabrikoj estas dioksinoj. Ĉi tiuj kemiaĵoj estas la plej kancerogenaj elementoj ĝis nun konataj. Ĝia tokseco estas tiel, ke eĉ la plej malgrandaj dozoj uzeblaj en laboratorioj (0,000000001 gramoj en kilogramo) produktas kancerajn kaj misnas-kadojn. Dum en landoj kiel Svisio aŭ Germanio oni malgrandigas draste la produktadon de dioksinoj, en aliaj kiel Hispanio ne ekzistas leĝoj, kiuj reguligas la emanadon de ĉi tiuj danĝeraj komponantoj.

Sed en septembro 1987 oni konigis, ke dioksinoj estas ne nur en restaĵoj el fabrikado, sed ankaŭ en produktoj envazigitaj en ujoj el blankigita papero. Ekzemple, kanadaj informoj denoncas, ke lakto envazigita en kartonaĵo enhavas pli da dioksinoj ol lakto envazigita en glaso.

La klorokalkon oni uzas por produkti paperon blankan kaj brilan. Normale oni ne bezonas tiajn karakterizojn en paper-fabrikoj, ĉar sufiĉas normalaj paperoj, tio estas ne tro blankaj kaj ne tro brilaj, kaj eĉ tiel, ekzistas metodoj por fabriki altkvalitajn produktojn sen neceso uzi kloron, kvankam iom pli kostajn.

Aliflanke, la produktado de ne-reuz-papero signifas detruon de grandegaj areoj de arbaroj kaj postan arbarumadon per rapidkreskaj specioj, kio signifas detruon de la tereno, erozion kaj klimatajn ŝanĝojn.

Ĉiu tiun aron da problemoj oni povas eviti uzante reuz-paperon (paperon kiun oni fabrikas laŭ novaj sistemoj, kun uzo de malgrandega kvanto da paperpasta kaj sen kloro). Ĉi tia nova tipo de industrio ne atakas la medion kaj favoras la ŝparon de energio kaj de naturaj rimedoj. Ĉi-momente ĝi estas iom pli kosta, sed se ni ĉiuj uzus nur reuz-paperon, la mendo grandigus la produktadon fronte al ne-reuz-papero, kaj do malgrandigus la koston.

Luiso Gilpérez Fraile

## RECENZO:

### "LA Karmezina manuskripto"

Eldonejo "Planeta". Barcelono, 1990.  
624 paĝoj.



Tuta vendo-sukceso, "El Manuskripto Carmesi" (hispane, "La karmezina manuskripto") estas la unua romano de la hispanlingva verkisto Antonio

Gala, per kiu li gajnis la literaturan premion "Planeta" por la jaro 1990. Espereble, ne necesas prezenti la aŭtoron al la hispana esperantistaro; tamen mi mencias liajn cirkonstancojn kaj preferojn laŭ la verko-fadeno.

Ĉar andaluzo kaj pro siaj konataj ligoj al la araba mondo, li prezentas, ne strange, temon propran al la plej arabisma andaluzaj naciismo, nome la vivon de la lasta maŭra reĝo de Granado: Boabdilo (t.e. Abū Abd Allāh). Kaj tion li faras kvazaŭ membiografie, nur indikante ankaŭ la situaciojn kaj okazaĵojn ĉirkaŭ la kristana konkerado de la lasta islama regno en la Ibera Duoninsulo.

Gala fikcias, kiel Cervantes en sia "Inĝenia Hidalgo", pretendante, ke Boabdil notadis, sur karmezina oficiala papero, siajn spertojn, elpensojn kaj pripensojn ĝis siaj lastaj tagoj en Fās (Norda Maroko). Kurioze, lia antaŭulo Abd Allāh jes ja verkis siajn memorajojn kvar jarcentojn pli frue, post kiam la almoravedoj/murabitoj (ĉi-foje do suduloj) detronigis lin. Sekve do temas pri verŝajna, kredebla fikcio, malgraŭ la konsterna malofteco de la ĝenro en la arabaj letroj.

La moralaj preferoj de la aŭtoro ŝajne reaperas en la mezepokaj topikoj pri la islamana sens-amo kaj ĝenerale en la agnostikaj meditoj pri ĉiaj vivo-flankoj, kiel ni trovas ĉie tra la verko. La arabismaj andaluzaj naciistoj vidos fidelan titolon de sia propra ideo-kadro. La islamanoj ne preteratentos ke ĉi tia legado de "La karmezina manuskripto" estas romanforma "laŭdo de la hispana islamo" el agnostika, tamen simpatie favora vidpunkto.

La instruiteco kaj kapablo de Antonio Gala kongruas kun la impona kvanto da informoj kaj kun la riĉega lingvaĵo, kiujn li malavaras ĉiu-paŝe. Tiom, ke foje la plektaĵo implikiĝas

labirinte, ĝis perdas sian vojon la profano aŭ la simpla leganto, kiu malbonŝance ne konas la scenaron de la romano.

Se resumi la artan signifon de ĉi tiu romano, ĝi aldonas nenion novan al la verko-tekniko, dum la enhavo tema kaj ideologia verŝajne eksmodiĝis kelke da jaroj antaŭ la publikigo. Nur la gazetara atentado al la araba mondo pravigus la reprenon de tia temo el merkata vidpunkto. El beletra, tia regurdado montras nur personan obsedon, kiu restas sen vekoj la universalvalorajn latentajojn de la temo. Mi pensas, ke malprobable japano ne oscedus ĉe la sentimentalaj de nuna hispano vekitaj de hispana historia epizodo. Precipe ĉar tia epizodo havas ekspluateblajn valorojn transpersonajn; ekzemplo estu la nepreco de vivo-ritmoj. Tamen, se konsideri la antropocentrismon de la romano, la rezulto ne ĉiam estas persone sentimentala, do legindas.

Kvankam plaĉa, la romano ŝajnas stilekzerco de virtuo-zismo, kiu espereble anoncu aplikon de tiel elstara talento al la romana arto.

R.F. Albert Reyna

\*\*\*\*\*

---

## Korespondadi deziras

30-jara polo, liberpensulo, dez. kor. pri lingvoj: hispana, kataluna, portugala, ktp. Ankaŭ plaĉas al mi ekologion, naturkuracadon, geografion. Bonvolu skribi: MAREK BAMBERSKI; Huta Stara, 120. 42-340 PINCZYCE. Polujo.

\*\*\*\*\*

Margot Acosta Fonseca, Av. Patricio Lumumba Nr. 75, 2 y 4. Reparto Los Olmos, SANTIAGO DE CUBA. Kubo. Dez. kor. kun ĉiuj landoj.

\*\*\*\*\*

Malena Rodriguez Corona, entre Habana y Marco 265. SANTIAGO DE CUBA. Kubo. Dez. kor. pri ĉiuj temoj.

\*\*\*\*\*

29-jara fraŭlo dez. kor. kun geĥispanoj pri muziko, geografio, kompostado, de kanzonoj kaj verkado. Mia adreso: Pedro Pablo Ramirez; Apartado aereo 3487. CARTAGENA, Colombia.

\*\*\*\*\*

Enrique Rodriguez Zombert; Corona Nr. 809, San Carlos y Santa Rita. SANTIAGO DE CUBA. Kubo. Deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

\*\*\*\*\*

Edgar Silvas Goite; Justo Salas Br. 5-7-9..Repto Asunsion.SANTIAGO DE CUBA.Kubo

\*\*\*\*\*

# VORTOJ DE LA INDIANESTRO "SEALTH"

Iam, la "Granda Estro el Vaŝingtono" deziris aĉeti terenon de la indianoj. La subaj vortoj estas la respondo de la tiama indianestro SEALTH.

"Kiel oni povas aĉeti aŭ vendi la firmamenton aŭ eĉ la varmon el la tero? Tia ideo estas nekonata por ni.

Se ni estas la posedantoj nek de la malvarmeto el la aero nek de la bri-  
loj de la akvoj, kiel vi povos aĉeti -  
ilin de ni?

Ĉiu peco de ĉi tero estas sanktega por mia popolo. Ĉiu brila pinglo de pino, ĉiu sablero el la bordoj, ĉiu akvero de roso en la mallumaj arbaroj, ĉiu altebena-  
ĵo kaj eĉ la sonc el ĉia insekto estas sanktega por mia tribo. La limfo, kiu cir-  
kulas laŭ la vejnoj de la arboj alportas la memoron de indianoj.

La blankuloj mortaj forgesas si-  
ajn landojn, kiam ili ekpromenas inter  
la steloj, tamen niaj mortintoj neniam  
forgesas ĉi tian bonegan teron, ĉar ĝi  
estas la patrino de la ruĝhaŭtuloj. Ni  
estas parto de la tero, kaj ankaŭ ĝi es-  
tas parto de ni. La parfumdonaj floroj  
estas niaj fratinoj; la cervo, la ĉeva-  
lo, la granda aglo, ili estas niaj  
fratoj. Pro ĉio tio, kiam la Granda  
Estro el Vaŝingtono sendas al ni la  
mesaĝon, ke li deziras aĉeti nian  
terenon, li petas troe de ni. La  
Granda Estro diras ankaŭ, ke li rezer-  
vos por ni lokon por loĝi komforte. Li estas nia patro, kaj ni  
estos liaj filoj. Pro tio ni konsideras sian oferton aĉeti  
nian terenon.

Tamen, tio estas nefacila, ĉar ĉi tereno estas sankte-  
ga por ni. La frosta akvo, kiu kuras laŭ riveroj kaj riveretoj,



estas ne sole akvo, sed la sango de niaj prapatroj. Se ni vendas nian terenon al vi, rememoru, ke ĝi estas sanktega, kaj ke ĉia fantoma rebrilo en la helaj akvoj de la lagoj rakontas la agadojn kaj memorojn de la vivoj de niaj gentoj. La murmuro de la akvo estas la voĉo de la patro de mia patro. La riveroj estas niaj fratoj kaj satigas nian sojfon: ili portas niajn kanuojn kaj nutrigas niajn filojn. Se ni vendas nian terenon al vi, vi devas rememori kaj instrui al viaj filoj, ke la riveroj estas niaj fratoj kaj ankaŭ viaj fratoj, kaj do vi devas trakti ilin same dolĉe kiel vi traktas fraton.

Ni scias, ke la blankulo ne komprenas nian vivmanieron. Li ne scias distingi unu pecon da tero disde alia, ĉar li estas strangulo, kiu alvenas nokte kaj prenas el la tero tion, kion li deziras. La tero estas por li ne frato, sed malamiko, kaj kiam li konkeras ĝin, li forvojaĝas lasante malantaŭe sen malĝojo la tombon de sia patro. Li forrabas la teron disde siaj filoj ankaŭ sen malĝojo. Tiel la tomboj de liaj patroj kiel la patrobieno de liaj filoj estas forgesitaj. Li traktas sian patrinon, la teron, kaj sian fraton, la firmamenton, kiel aĵojn aĉeteblajn, ekspluateblajn aŭ vendeblajn kiel ŝafinoj aŭ koloraj birdoj. Lia apetito formanĝos la teron, lasante malantaŭe nur dezerton. Mi ne scias, sed nia vivmaniero estas malsimila al la via. La nura vido de viaj vilaĝoj malĝojigas la okulojn de la indianoj. Sed eble tio okazas, ĉar la indiano estas sovaĝulo kaj komprenas nenion. Ne ekzistas trankvila loko en la vilaĝoj de la blankulo, nek ekzistas loko, kie aŭdi kiel malfermiĝas la folioj de la arboj printempe aŭ kiel flugilumas la insektoj. Sed eble ankaŭ tio okazas, ĉar mi estas sovaĝulo, kiu komprenas nenion.

La bruo ŝajnas insulti viajn orelojn. Sed entute, por kio taŭgas la vivo, se la homo povas aŭdi nek la solan krion de la kaprimulgo nek la noktajn misparoladojn de la ranoj rande de la lageto? Mi estas ruĝhaŭtulo kaj komprenas nenion. Ni preferas tiel la blovan susuron de la vento sur la supraĵo de la lageto, kiel la odoron de tia vento purigita de la tagmeza pluvo aŭ parfumita de pinaromoj...

La aero havas nemezureblajn valorojn por la ruĝhaŭtuloj ĉar ĉiuj vivaĵoj partoprenas saman elspiron -la besto, la arbo, la homo, ĉiuj elspiras saman aeron-. La blanka homo ne ŝajnas konscia pri la elspirita aero, same kiel ulo dumlonge

agonianta estas nesentema al la haladzo. Sed se ni vendas al ili niajn terenojn, ili devas memori, ke la aero estas ŝatinda, ke la aero kundividas sian spiriton kun la vivaĵoj, kiujn ĝi subtenas. La vento, kiu donis al niaj geaĵoj la unuan blovon de vivo, ankaŭ ricevas iliajn lastajn finelspirojn. Kaj se ni vendos niajn terenojn, vi devos konservi ilin kiel apartan kaj sanktegan aĵon, kiel lokon kie eĉ la blankulo povu flari la venton parfumitan de la ebenajaj floroj. Pro tio, ni konsideras vian ofertan por aĉeti niajn terenojn. Se ni decidis akcepti ĝin, mi metos kondiĉon: la blankulo traktu la bestojn de tiu tero frate.

Mi estas sovaĝulo kaj ne komprenas alian vivmanieron. Mi rigardis milon da bubaloj putrantaj sur la altebenaĵoj, mortintaj pafe de la blankulo en marŝantaj trajnoj. Mi estas sovaĝulo kaj mi ne povas kompreni, kiel fumanta maŝino povas interesi pli ol bubalo, kiun vi mortigas nur por supervivi.

Kio okazus al homoj sen la bestoj? Se ĉiuj bestoj estus ekstermitaj, ankaŭ la homo mortus pro granda spirita soleco. Ĉar tio, kio okazos al la bestoj, okazos ankaŭ al la homoj. Ĉio estas kunligita. Vi instruu al viaj gefiloj, ke la grundo, kiun li surtretas estas la cindro el niaj praavoj, ke la tero estas riĉigita per la vivoj de niaj samuloj, por ke ili sciu respekti ĝin. Instruu al viaj gefiloj, ke ni instruis al la niaj, ke la tero estas nia patrino. Ĉio, kio okazos al la tero, tio okazos al la filoj de la tero. Se la homo kraĉas sur la grundon, li kraĉas sur sin mem. Ĉio estas kunligita. Samkiel la sango kunligas la familion, tiel ĉio estas kunligita.

Kio okazos al la tero, tio okazos al la filoj de la tero. La homo ne teksis la vefton de la vivo. Li estas nur fadeno. Kion li faras el la vefto, tion li faras al si mem.

Eĉ la blankulo, kies Dio promenas kaj parolas kun li amike, ne restas libera de la komuna destino. Se ĉion konsideri, ni eble estas fratoj. Tion ni vidos. Ni scias ion, kion eble la blankulo ekrimarkos iun tagon: nia Dio estas la sama Dio. Vi povas pensi nun, ke li apartenas al vi, same kiel vi pensas, ke niaj terenoj apartenas al vi, sed ne estas tiel. Li estas la Dio de la homoj, kaj Lia kompatito estas disdonita poe, same al indianoj kiel al blankuloj.

Ankaŭ la blankulo estingiĝos, eble antaŭ ol la aliaj tri-



boj. Ili malpurigas siajn dormejojn kaj unu nokton pereos drone en siaj propraj restaĵoj. Sed vi transiros al via propra detruo ĉirkaŭite de gloro, inspirite de la forto de Dio, kiu alportis vin al tiu tero kaj kiu, pro ia speciala nomumo, donis al vi superregon pri ĝi kaj pri la indianoj. Tia destino estas mistero por mi, ĉar mi ne komprenas, kial la bubaloj estas ekstermataj, la sovaĝaj ĉevaloj dresataj, la sekretaj anguloj de la arbaroj saturitaj pro la elspiro de tiom da homoj, kaj la vidindaĵoj de foliriĉaj montetoj difektitaj de parolantaj kabloj.

-Kia estas la arbitaro?

-Detruita!

-Kie estas la aglo?

-Ĉi malaperis!

*Finiĝas la vivo kaj komenciĝas la supervivo.*

*Trad. el la hispana: L. GILPEREZ*

\*\*\*\*\*

## Administra angulo

Pagis sian respektivan ĉi-jaran abonon jenaj k-doj:

Miguel Gutierrez Adúriz . . . . .	800,-	Ptojn
Kantabra Esperanto-Asocio . . . . .	800,-	"
Francis Bourgaux . . . . .	1.000,-	"
	<hr/>	
Sumas pago de abonantoj	2.600,-	"

## Agrabla novaĵo

Kun granda ĝojo ni ricevis la novaĵon pri la edziĝo en Moskvo dum monato aŭgusto de k-do Joan Manau Valor, iama komitatano-fondinto de HALE.

Al la feliĉa paro, kiu de nun loĝos en nia lando, same kiel al nia amiko Ramón Manau, SAT-Peranto en Hispanio, ni esprimas tutkoran gratulon. Feliĉon al vi, kara Joan!

La Redakcio.

# Iberoj akaparas premiojn!

## Rezultoj de la Belartaj Konkursoj

### Poezio:

**1-a premio:** Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro *Monologo kun Mediteraneo*.

**2-a premio:** Miguel Fernández (Hispanio) pro *Iama am' aŭ songo ĉiunokta*.

**3-a premio:** Gonçalo Neves (Portugalia) pro *Metropulo*.

**Honora mencio:** Gonçalo Neves (Portugalia) pro *Lavistino fonta* kaj Miguel Fernández pro *Poeto*.

Partoprenis 57 verkoj de 20 aŭtoroj el 19 landoj.

### Prozo:

**1-a premio:** Miguel Fernández (Hispanio) pro *Ek al barikadoj!*.

**2-a premio:** Liven Dek (Hispanio) pro *Semo*.

**3-a premio:** Gonçalo Neves (Portugalia) pro *Jozefo*.

**Honora mencio:** Miguel Fernández pro *Esencen persense*.

Partoprenis 25 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj.

### Teatraĵo:

**1-a premio:** ne aligita.

**2-a premio:** Sten Johansson (Svedio) pro *Savboato*.

**3-a premio:** Stefan McGill (Hungario) pro *Konvena Rezulto*.

**Honora mencio:** Abel Montagut (Katalunio) pro *Don Kihoto eksterlande* kaj Sten Johansson pro *Heliko — aŭ podia diskuto pri la lingva evoluo de esperanto*.

Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

### Eseo:

**Premio Luigi Minnaja:** ne aljuĝita.

**Honora mencio:** Waldek Pastuszka (Polio) pro *Problemoj kaj eblecoj de ŝaradtaska kreado en esperanta lingvo*.

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

**Premio An-okin pri kanto:** Flávio Fonseca (Brazilo) pro *Babelturo* kaj Miguel Fernández, teksto, kaj Pedro Vilarroig, muziko, (Hispanio) pro la kantoj *Amtemo* kaj *Tarde*.

Partoprenis 9 kantoj de 5 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 5 landoj.

**Premio nova talento:** ne aljuĝita.

**Premio Infanlibro de la jaro 1992:** *Tiel do. Rakontoj por malgrandaj infanoj* de Rudyard Kipling; tradukita el la angla de Wouter F. Pilger. Eldonita de Vulpo-Libro, Lelystad (Nederlando).

Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

**Fotografio kaj vidbendo:** Anoncotaj en la Solena Fermo.



# Junulara angulo

## La junuloj pretaj por la batalo

Ĉu la gejunuloj ankoraŭ deziras batali? Jes, tian demandon mi starigas al ĉiuj, por ke ĉiu pripensu serioze. Rilate al aprila numero de "Sennaciulo", la P.K. de SAT lanĉas proponon al gejunuloj, por ke ili reorganiziĝu kadre de la SAT-JF, por ke ili varbu en la SAT-vicoj.

Pro tio mi proponas per ĉi tiu artikoleto kelkajn opiniojn pri juneco kaj politika movado (ja mi ne tre ŝatas tiun vorton).

Unue mi devas nepre konsideri, ĉu la gejunuloj interesiĝas pri tiaj aferoj kiel senlaboro, militservo, sekso, rasismo, subpremado, ktp. Ĉi tiuj temoj estas aktualaj kaj seriozaj, kaj bonŝance multaj gejunuloj agadas aktive, kiam ili batalas kontraŭ la maljusteco kaj subpremado, per pluraj organizoj. Kompreneble mi parolas pri maldekstraj kaj neaŭtoritatemaj movadoj. Ekzemple, en Hispanio ni gejunuloj forte kaj pace batalas kontraŭ la Armeo. Ni konsideras ke ĝi kaŭzas militojn kaj mizerojn al la homaro (kvankam la politikistoj opinias male). Sekve ni proponas rifuzi militservon. Neniel ni deziras rekrutiĝi en la armeaj vicoj de nia lando. Malsubmetiĝemo al la Armeo estas nuna lukto de la hispana junularo, kiu kaŭzas grandajn zorgojn al ŝtato.

Verŝajne la gejunuloj interesiĝas pri pluraj aferoj (ne tiom da gejunuloj, kiom mi dezirus). Tamen, kial multaj gejunuloj ne estas en la Esperanta movado i. a. en SAT? Ĉu ili rigardas Esperanton ĝusta ilo por batali? Kial la junaj esperantistoj preferas TEJO-n al SAT-JF?

La plejmulto el la gejunuloj kiuj interesiĝas pri Esperanto preferas partopreni en pluraj aranĝoj politike "neŭtralaj": vojaĝoj, korespondadoj, kongresoj, renkontiĝoj... tiuj estas aferoj, kiuj ankaŭ tre plaĉas al mi, sed mi tute ne komprenas, ke Esperanto devas esti neŭtrala, nur lingvo por interkomunikiĝo. Laŭ mia opinio Esperanto havas alian signifon, ĝi devas ebligi socian progreson kaj batali favore la liberecon kaj egalecon de la homaro. Sekve ĝi estas ne nur lingvo aŭ hobbio sed ankaŭ batala rimedo.

Konsekvence mi ne simpatias kun la organizoj kiel UEA kaj TEJO, ĉar ili nur vidas tiajn eblecojn, laŭ mia vidpunkto, nesufiĉajn. Se la gejunuloj parolantaj Esperanton postulas ŝanĝi la nunan socion kaj progresi al homa emancipiĝo, do, ni devas vigle agadi, vivigi SAT-JF, eldoni daŭre gazetojn, ebligi interŝanĝojn, kongresi (se tio eblos)... definitive, batali kune, same kiel en la hispana intercivitana milito, kiam alvenis multaj internaciistoj kaj sennaciistoj por batali por la revolucio kaj forpeli la faŝismon. Tial mi demandas min: kion devas diri la gejunuloj pri la tragika milito en eks-Jugoslavio? Kial la afrikanoj daŭre suferas militojn kaj mizerojn? Ĉu la ger-

manaj "aŭtonomuloj" sukcesos batali kontraŭ la novnaziistoj? Kio okazas pri Latin-Ameriko?

Mi scias, ke la gejunuloj ja havas siajn opiniojn pri tiuj aferoj. Pro tio ĉiu el ni devas diskonigi tiajn demandojn kaj konscii pri la justaj respondoj.

Konklude mi pensas, ke la gejunuloj ankoraŭ povas montri siajn proprajn pensojn, kaj sekve, ni povas batali kontraŭ la maljusteco. Ni mem konas jam historiajn spertojn: Nikarakvan revolucion je 1979, Hispanan revolucion je 1936-39, Parizan ribelon 1968... Ne timu, juna amiko, la Revolucio EBLAS!

Jorge Alcañiz

\*\*\*\*\*

---

## Originala Poezio

### ALVOKO EN TIOM MINORA

Tiom flaradi l' floron de la verde,  
ke ties ver' aperas senaroma.  
Tiom kontempli l' korpon finavenkan,  
ke ni ne scias, ke l' anim' oldiĝis,  
kaj ke la kor' ankoraŭ  
pli maltrakvile batas.  
Tiom plejalten sori  
per la impuls' de nia klara pravo,  
ke nin la mond' ne vidas de surtere.  
Tiom da vortoj... trafaj, jes, kaj tiom  
da farendajoj.

Tiom da futuro.

Sed faktas ni kaj nunas  
-la dispopolo-:

        jamas; amas, hatas;

asketas kaj voluptas;  
akuŝas dolorspasme kaj naskiĝas  
sen steloj sur la brusto,  
sen nimboj de sankteco,  
sen fonoj anĝelĥoraj,

        sed kun kriĉoj,

kun la terur' krampita al la ventro,  
kun nia haŭto plena de makuloj  
placentaj, sinaj, sangaj;

        ankaŭ mortas:

Homoj!

Nek pli nek malpli.

Komunaj homoj ni -feliĉe, simple-  
en interlig' unika:

respektive  
esenc' kaj akcidenĉ' de Poezio.

Poetoj esperantaj, do poetu:  
skulptu fajrvorte nian opan memon  
-la hodiaŭan-

nuda kaj senkarna.  
Sed, antaŭ ĉio, venu al la homo:  
demetu la laŭrkronon,  
la tonon profesoran,  
la senpekecon ŝajnan,  
forlasu l' empireon

kaj

d  
e  
s  
c  
e  
n  
d  
u

al ni,

al tiu ĉi viv-morto ĉiutaga

-nia belo

el koto kaj el puro,  
el aspro kaj atlaso-,

al kanvaso  
de niaj faroj pitaj kaj gigantaj.

Defloru la lirikon karn-ostulan.

( Ne skandu plu rozroson kaj versajlojn.


Ne trivu plu aŭtunojn verleneskajn.

Ne fermu plu la sentojn

en la prizonon striktan de la normoj:

formoj

perfektaj dokte, pave, fride, ŝrumpe).



Siropon for!

Elprenu

al ni el vortoj dolĉon kaj acerbon;  
el ĉiu verso, svarmon sonorvibran;  
por ĉiu senso, kosmon da sensacoj;  
por ĉiu kor', ties poemon-veron.

Revenigu

al nia febla vino ĝian ŝaŭmon  
-velkas la glasoj, orfaj je bobeloj;  
langvoras niaj gorĝoj;  
la lipoj splenas,  
sopiras,  
ve!-  
Kaj ebriigu nin.

Ekpaŝu ŝlimen:

ekpaŝu al serĉantoj de lilioj,  
la vejnojn disfenditaj.

Kaj aliĝu.

Kaj trubaduru sprone mil homaĵojn.  
Kaj tegu nian penon per koloroj.

Estas la ĝusta horo por alstrebi  
per pleje fajnaj liroj en la nuno  
kaj nin kaj nian tempon de ĉerizoj.

Miguel Fernández Martín

Notoj.

- 1.- Ĉi verko ricevis Honoran Mencion en la 32-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazintaj pasintjare.
- 2.- Ĉiuj leksemoj uzitaj ĉi-poeme troveblas en PIV kun Suplemento, escepte de: Hati= Malami.

\*\*\*\*\*

---

## Provo de intuo ĉirkaŭ la poezio de Miguel Fernández

Mi agnoskas, ke mi ne legis la poezion de Miguel Fernández abunde nek redunde. Kaj mi konas (kaj rekonas) la personecon de nia granade madrida poeto tradukanto pli persone ol perverse. Jen konfeso. Nun -akceptu miajn asertojn kiel impresojn neniel pripensitajn, nur spontane ŝprucintajn kaj dis-

verŝitajn inke sur ĉi paperon.

En aborta konversacio en la "Beletrejo" (jen ĉarma trinkejo en tradicia, trankvila kvartalo de nia centra ŝajn-antikva Madrido), li kaj mi interŝanĝis vortojn pri la centra rolo de la haŭto en lia poezio, eĉ kiam li ne uzas tiun vorton; pri la traspirebla sensismo, kiu faras el la haŭto baron kaj perilon. Hodiaŭ mi ŝatus aldoni impresojn, hieraŭ ne sukcese vortigitajn.

Pardonu min, Miguel, se mi perfidas vin miskompreni. Reokulu supren kaj komprenu: mi nur provas intui vian poezion, tamen ĉirkaŭe, ne interne; ĉar la interno, kiel la haremo, neniam vidiĝas, kvankam ĝi nemalhaveblas por ke la tuto funkcii. Kaj mi avidas, ke vi plu "funkciu" poete, eĉ po-ege (ĉar pro-eme).

Kio estas poezio? Kio estas via poezio? Kiam mi papilias ĉirkaŭ ĝi, intuo altrudas sin, ke vi saŭdadas intimon. Ĉiu kareso kaj percepto, ĉiu tuŝo kaj ĝu-ĝemo, ĉiu kiso kaj rideto, ĉiu belbela, nebeligebla orgasmo, ĉi ĉio estas amo-ritoj, per amoraj envultoj celantaj transcendon, kvazaŭ vi volus droni trans vian kaj ŝian personecojn ĝis tia transpersona intimo, kia tamen (kaj prave) kompletigas vin aŭ ivin; kie nun la diferenco? Kompletigus vin, se vi nur konscius.

Sed jen la haŭto obsedas vian atenton kaj via homa konscio, ĉar homa, ne ĉirkaŭbrakas la neesprimeblan, kiun viaj poemoj ĉirkaŭas. Vi papilias ĉirkaŭ la kerno de via poezia sento, kiel mi papilias ĉirkaŭ viaj versoj.

Pardonu re! Mi ne celas kompari nin ambaŭ. Tio restu for de miaj provoj! Ĉar viaj poemoj estas la mielo de tiu kerna florigardeno, dum mi nur - imagas, laŭ la aromo, la guston de tiu nektaro. Vi havas ĝardenon da sentoj, sensoj, kaj sensacoj. Kaj vi esprimas la dumondecon de via mondo per la sensacia lerteco de doganisto kiu, ĉe la haŭto-limo, libere promenus (kia envio!) transmonde kaj cismonde.

Kiel alia granadano antaŭ vi, li -araba, nomiĝis la "Duvivulo" (tiom li verkadis, kiom du personoj), jen vi meritas certe la nomon de "Dumondulo".

Nu, la poezio eble esploras la limojn de la homa esprimado serĉante intuan vojon al supera, firma sciado. Ĉu estas tiel, ĉu maltiel, mi vidas vin ĉe limo ene de tiu limo. Via poezio povas simboli la tutan poezion, kiam vi karesas vorte la limojn de la homa intima sciado per la tujaj (tamen sekrete ellaboritaj) rimedoj de homa sensado. Por vi, koni estas senti, kaj ambaŭ estas senti; pro kio vi poemas. Sed feliĉe, vi ne montras vin banale sentimental. Vi kuraĝas ĉirkaŭbraki intimajn flankojn de via poeta personeco por dividi ilin kun ni, viaj legantoj. Kaj ni povas nur danki, ke estas tiel; almenaŭ en ĉi epoko, kiam iuj volus altrudi pasemajn pseŭdoleĝojn de poezio, jen formajn, jen enhavajn, al tiu spaco de libero, kiun konsistigas la esprimado de la interna belo.

R.F. Albert Reyna

**Kajeroj** ———  
— **el la Sudo**



---

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

---

**REDAKCIU: Str. Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.  
50002 - Zaragoza (Hispanio)**

---

Depósito legal: Z - 2398 - 88

Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.